*(teksto de filmeto okaze de Zamenhoftago 12.12.2020 – kun eta aktualigo)*

Saluton!

Unue por tiuj kiuj ne konas min: mi estas Marc Vanden Bempt el Loveno.

Mi volas iom rakonti al vi pri nova projekto, kies unuaj paŝoj ĵus realiĝis.
Ekde nun bone enkapigu al vi la mallongigon IEA kaj la plenan nomon, Internacia Esperanto-Arkivo. Tiu lasta vorto samtempe estos la nomo de la retejo ĉe .eu, tio estas arkivo.eu,kiu baldaŭ aperos.

Sed pri kio temas?
Kiel pluraj el vi scias, mi de multaj jardekoj kolektadas librojn kaj revuojn en Esperanto kaj pri Esperanto.  Sed kio okazos al tiu kolekto post kiam mi iam estos mortinta? Al rubujo, eble? Tamen estas unikaĵoj inter ili, do mi nepre volas eviti tian finan destinon.

Ankaŭ pluraj el vi scias pri alia afero: la kolekto de César Vanbiervliet nun vere decidite devos forlasi la bibliotekon de Kortrijk.
Roland Rotsaert organizis la destinojn de tiuj libroj , revuoj kaj aliaj dokumentoj Multegaj iros al la biblioteko Hendrik Conscience en Antverpno, aliaj iros al Kadok kaj Amsab - kadre de ilia celo, la restaĵon mi transprenis.
Tiel mi nun havas ĉi tie la du kolektojn kiel tutaĵo: pli ol 20.000 libroj, plenaj revujaroj kaj dokumentujoj.

Nu, mi jam nomis la Internacian Esperanto-Arkivon. Tio estas nova asocio, vere nova ĉar la fondado kiel jura persono okazis en la 25-a de januaro 2021.
Ĝian celon mi laŭtlegas el ĝia tradukita statuto: “La asocio celas: kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn en kaj pri Esperanto kaj planlingvoj, en sia originala formo. Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro.” Klare.

Per tio mia kolekto sendependiĝas de mia persono kaj mi baldaŭ povos trankvile morti.

Klare estu ankaŭ ke IEA ambicias kreski ĝis la plej granda tia arkivo en la mondo. Sed restis tri aferoj solvendaj: unue, loko por gardi la kolekton, due, volontuloj por evoluigi ĝin, kaj trie, tre grave ankaŭ: mono.

Por la loko ekzistas pluraj eblecoj: ni esploras ejojn en Belgio, Slovakio, Kroatio kaj aliaj landoj. Dumtempe la kolekto povas resti en Belgio.
Ankaŭ jam estas kelkaj volontuloj, tiu teamo kresku. Ĉu eble ankaŭ vi?

Restas la mono, multa mono. Unu persono, kiu preferas ne malkaŝi sian identecon sed kiun ni ege dankas, jam donacis grandegan sumon. Restas kelkcentmil eŭroj kiujn ni baldaŭ ie devos trovi.

Mi prezentas nun ĉi tiun Arkivon al vi, por ke vi sciu pri ĝi. Sed samtempe tio ĉi estas sciigo, ke la realigo povas ankoraŭ stumbli aŭ eĉ nuliĝi (ekstreme), se ni ne trovos tiun monon. Ni kreis eblecon por "Amiko de IEA" kiu pagu iun sumon ĉiujare, por la kurantaj kostoj. Krome eblas aĉeti brikon simbolan por le ejo.

Nun precipe mecenatoj estas serĉataj, por la fondado.
Do homoj kiuj pretas vere fundamente subteni la arkivon per granda ŭnufoja donaco, imagu 1.000 eŭrojn aŭ pli. Ĉar temas pri la fondado, tiuj mecenatoj estos eternigitaj kiel homoj kiuj kune formas la asocion kaj ties bazon, do la bazon de la Internacia Esperanto-Arkivo, homoj kiuj do kvazaŭ kunfondis ĝin.

Ĉu ankaŭ vi alparolos la de vi konatajn homojn? Ĉu ankaŭ vi informos pri tiu asocio, pri tiu nova Arkivo kaj pri la propono iĝi ĝia mecenato? Eble vi persone ankaŭ mem serioze prikonsideros iĝi mecenato?

La aliajn tri kondiĉojn - tio estas la asocio, ejo kaj helpantoj - ni solvis jam.
Mi ege esperas nun ke la kvara kondiĉo – la mono - ankaŭ sukcesos kaj mi fakte kalkulas por tio je vi!